********************************************************************************

INSTRU-CIRKULERO 2018/02 (decembro 2018)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

********************************************************************************

Per tiu ĉi informilo ni peras interesaĵojn pri instruado, pri eventoj rilate al kursoj, klerigado kaj alvokojn, novaĵojn. Aldoniĝis kelkaj aliaj interesaĵoj kaj mallonga resumo de la dua duonjaro de 2018.

Karaj Gekolegoj!

Mi planis pretigi tiun ĉi cirkuleron ankoraŭ en la fino de 2018, sed ne sukcesis fini ĝin, do jen mi deziras al vi ĉiuj tuj je la komenco de 2019 sukcesan novan jaron, bonan sanon kaj multe da ĝojo, feliĉo! Dankon al ĉiuj niaj membroj pro la subteno al nia landa sekcio en 2018 kaj remembriĝo en la nova jaro. Havu forton por daŭrigi vian Esperanto-agadon kaj havu tempon, emon komenci novajn kursojn, transpreni novajn taskojn por instruado, Esperanto-aktivado.

Komence de 2019 ni sendu nian gratulon al ILEI okaze de la 70-jariĝo! Prosperan jaron, sukcesojn al nia internacia ligo!

## Gravaj alvokoj: kursoj, trejnado

**1. Intensa Esperanto-kurso** inter **18-22 marto 2019** (ankaŭ kiel agnoskita klerigcela feriumado **Bildungsurlaub**) okazos en la Esperanto-Centro en Herzberg en kunlaboro kun VHS (Popolaltlernejo) Göttingen.

Detaloj kaj aliĝilo:
https://vhs-goettingen.de/programm/fremdsprachen/kurs/Bildungsurlaub+-+Esperanto+Intensiv/nr/19F78950/bereich/details/

Lecionoj: ĉiutage inter 8:30-16:30, sed fakte temos pri tuttaga lernado, kiu ebligos liberan lingvouzadon dum posttagmezaj ekskursoj, urborigardado, vesperaj kunvenoj kun babilado, kantado, ludado, ktp.
La kurso estos internacia, jam ni havas aliĝintojn ekz. el Francio.

Kotizo: 175 €, loĝado, manĝado estos favorpreze solveblaj en la Esperanto-Centro aŭ en malmultekostaj najbaraj ferioloĝejoj, ktp.

La alvoko celas komencantojn sed la kurso taŭgas **por pluraj niveloj,** instruos Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar kun porokazaj helpantoj, do ni povos samtempe instrui grupetojn kaj ĝojus ankaŭ pri perfektiĝemuloj / instruemuloj, kiuj ŝatus lerni metodojn kaj mem praktiki instruadon.

Bv. plusendi informon per multaj kanaloj kaj varbi partoprenontojn por sukcesigi la kurson! Se vi ne uzas la retan aliĝilon, bv. simple skribi al ni leteron aŭ retmesaĝon al esperanto-zentrum@web.de

***

Estas ĝojige, ke en pluraj urboj estas aŭ estos lernofertoj en VHS-kursoj, ekz. en Frankfurt/Oder, Stuttgart, Kaiserslautern, Frankfurt/Main. Ni esperu, ke la bonaj iniciatoj havos rezulton!

Bv. ne forgesi registri viajn lernejajn kaj movadajn kursojn ĉe www.edukado.net!

***

**2. La Esperanto-Centro (Klerigejo de GEA)** en Herzberg ankaŭ en 2019 organizos **klerigseminariojn**, instrukapabligajn sesiojn kaj trejnadon por movadaj fakuloj.

La instrufakoj estas variaj: literaturo, gramatiko, (inter)lingvistiko, movadhistorio, metodiko, informado, varbado, Esperanto-kulturo, ktp.

La lernadon, trejnadon helpos la ellaborata interreta klerigplatformo, kie estos je dispono ankaŭ fakliteraturo, kontrol-testoj, ktp.

**Datoj en 2019: 29-31 marto, 28-30 junio, 03-06 oktobro (TORPEDo), 13-15 decembro**

**2019 estos la jaro de la jubileo de ILEI – ĝi iĝis 70-jara! Gratulojn al ĉiuj ĝiaj membroj kaj dankoj al ĉiuj, kiuj portis ĝin dum tiom da jaroj! Ni deziru al nia Ligo vivi plu kaj plu, prosperi kaj ĝui sukcesojn en tutmonda disvastigo de Esperanto kaj efika instruado de la lingvo!**

Okaze de tiu jubileo la Estraro akceptas kaj bonvenigas iujn ajn ideojn pri instruado de Esperanto, pri la Ligo mem, pri ĝia festo, ĝia evoluo, ĝia kresko ktp, ktp…
Tamen por atingi tiujn celojn, necesas multe kaj multe labori.

La Estraro komencis pripensi kaj prepari la celebron de la jubilea por la Ligo jaro. Estis kreita emblemo de la jubilea jaro, proponita plano de celebraj eventoj. La Estraro esploras diversajn informfontojn pri la historio kaj agado de la Ligo. Estas serĉata kunordiganto por la tuta evento. La Estraro planas kreadon de filmo, dediĉita al agado de ILEI kaj ĝia jubileo.

**1. La 52-a KONGRESO de ILEI (13-20 julio 2019) en Ĉaĉak, Serbio**
En la ĝisnunaj preparoj estas difinitaj du ĉefaj aksoj de la kongresa programo:
- Solenado de la 70-a datreveno de ILEI
- Traktado de la kongresa ĉeftemo "Lernado en virtualaj komunumoj" en kunteksto de la *Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj 2019* proklamita de UN (subtemoj: Virtualaj lernkomunumoj de indiĝenaj lingvoj, Lernado de indiĝenaj lingvoj en virtuala medio).

La estrarano pri kongresoj kaj LKK interkonsentis kun la estraro de la kongresurba Fakultato de Teknikaj Sciencoj, gastigonto de la kongreso, ke enkadre de la kongreso okazu trilingva (Esperanto, la serba, la angla) internacia konferenco pri la kongresa temo kun la Fakultato kaj ILEI kiel kunorganizantoj. Tio ebligos, ke:
- La *Edukministerio de Serbio* povos agnoski la konferencon en sia registro de internaciaj konferencoj donantaj al siaj partoprenantoj certajn poentojn por avanco en la universitata kariero.
- La *Serbia Instituto pri Progresigo de Edukado* povos rekoni ĝin kiel seminarion por mezlernejaj kaj bazlernejaj instruistoj, kiuj bezonas partoprenon en fakaj seminarioj por pluvalidigo de la instruista licenco.
La *Fakultato* tra siaj komunikkanaloj kaj organizaj rilatoj entreprenos paŝojn por atingi tion kaj por varbi neesperantistajn partoprenontojn. Tio, kaj la iniciatita kunlaboro de LKK kun la serbia sekcio de AEDE, donos ekstermovadan institucian subtenon al la popularigado de Esperanto inter universitataj, mezlernejaj kaj bazlernejaj instruistoj en Serbio.

Aliaj programaksoj de la kongreso, la kultura kaj turisma, por nun estas traktataj de LKK kunlabore kun loka virina kantgrupo "Lira" (Liro), infana folklora grupo "Bambi", Etno-metiista asocio kaj Turisma organiza organizaĵo de la kongresurbo Ĉaĉak, kaj estos ankoraŭ traktataj kun aliaj esperantistaj kaj neesperantistaj kulturkreantoj kaj turismaj agentejoj.

**2. UEA kaj ESF** kreis novan paĝaron, internacian mapon pri kursoj kaj studprogramoj rilataj al Esperanto nur en supera edukado:
http://kunagade.org/portfolio-item/kursoj-kaj-informaj-agadoj-rilate-al-esperanto/
Bv. viziti la paĝon kaj indiki, se vi havas kurson en supera edukado.

**ILEI kaj ESF:** Temas pri klopodo intensigi la agadon por Esperanto en universitatoj**.** Se vi instruas aŭ instruis en universitato kaj parolas Esperanton, bonvolu plulegi kaj reagi:

* sendu vian nomon, urbon, landon, ret-adreson, fakon pri kiu vi instruas aŭ instruis al la retadreso esperanto.en.universitatoj@gmail..com
* se vi instruas kurson pri Esperanto aŭ interlingvistiko en via universitato, informu ankaŭ pri tio.
* se vi deziras financan helpon de ESF por realigi sciencan esploron pri Esperanto aŭ interlingvistiko, bonvolu rigardu la kriteriojn: https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/esf-stipendioj/
* se vi deziras financan helpon de ESF por partopreni sciencan konferencon aŭ kongreson neesperantistan por prezenti tie referaĵon, bonvolu rigardi la kriteriojn:
https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/esf-stipendioj/
* se vi ŝatus partopreni la laborojn de reto de universitatanoj por internaciigi la universitatan medion per Esperanto, informu ankaŭ pri tio.

**3. Kunlaboro kun la Eŭropa Asocio de la Instruistoj.**

Jen alvoko de Germain Pirlot, kiu esperas, ke en 2019 multaj el vi denove konsentos laŭeble kunlabori por havigi informojn pri instruado por la trimonata Inform-bulteno de la belga AEDE-sekcio (Association Européenne Des Enseignants):

„Ĉar la redaktistino estas tre kontenta pri tia bonega kunlaboro, ŝi havas jenan sugeston por la jan.-febr.-marta bulteno: la studoj por la formado de instruistoj por elementaj lernejoj (6-12 j.), mezgradaj lernejoj (12/13-15 j.), liceoj (15/16-18 j.). Sen tro da detaloj!

- Kondiĉoj por esti akceptataj: laŭ diplomo? post ekzameno?
- Kie: universitato, supera instituto? dum kiom da tempo?
- Elementoj: ĉefe fakoj aŭ pedagogio?
- Ĉu la psikologio de infanoj, de adoleskantoj, la grupa dinamiko, la mastrumado de konfliktoj, la antaŭzorgo, aŭ la strebo kontraŭ nuntempaj temoj, ekzemple la persekutado aŭ la toksomanio, estas parto de baza trejnado aŭ nur proponitaj en daŭra edukado aŭ moduloj? Laŭ staĝoj surloke kaj kiam dum la studoj?

La "preferinda" limdato por la sendo de tiaj informoj estus la 20-a de februaro (plej malfrue la 5-an de marto). Antaŭdankon pro eventuala transsendo de tiu peto al gekolegoj, kiuj pretus kunlabori."

**4. La 42-a esperantologia konferenco en Lahtio (UK 20-27.07.2019)**

Alvoko de Orlando E. Raola, organizanto:

La organizantoj alvokas ĉiujn fakulojn, sciencistojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la Esperantologia Konferenco 2019, okazonta en Lahtio, Finnlando, kadre de la 104-a Universala Kongreso de Esperanto, sub la aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

La ĉi-jara aranĝo pritraktos du specialajn temojn:

- la interlingvistikan aliron al piĝinoj kaj kreoloj, fenomenoj ĉiam interesaj al esperantologoj. (La temon proponis d-ro Bengt-Arne Wickström).
- la indiĝenajn lingvojn: nuntempo kaj estonteco, okaze de la deklaro de Unuiĝintaj Nacioj por 2019: Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj.

La konferenco okazos en du partoj: dum la unua ni aŭskultos prelegojn de fakuloj pri la konferencaj specialaj temoj. En la dua parto la partoprenantoj denove havos la ŝancon prezenti siajn laborojn pri plej diversaj kampoj de esperantologio. La kontribuoj de tiu parto povos esti prezentitaj ĉu parole, ĉu per afiŝoj.

Ni invitas ĉiujn fakulojn, aparte junulojn kaj unuafojajn partoprenantojn, sendi proponojn, speciale pri la prezentoj per afiŝoj, kiel eble plej baldaŭ al ek@kulturo.net.

La limdato por la proponoj estas la 30-a de aprilo 2019.

**5. La 56a Internacia Esperanto-Sumoo** komenciĝis en dimanĉo, la 13an de januaro kaj daŭros ĝis la 27a.
La marta sumoo komenciĝos la 18an de marto por 15 tagoj.

Por partopreni bv. sendi jenajn datumojn:

- via sumoo-nomo, vera nomo, sekso, urbo kaj lando
- libro kaj kvanto da paĝoj por unu tago, kiun vi legos dum la sumoo-periodo.

Por scii pri la sumoo, vizitu la retejon, Vikipedian kaj Fejsbukan paĝojn:
http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html
https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo
Fejsbuko: https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts
Paĝo de recenzoj: http://www.esperanto-sumoo.pl/recenzojmaj2018.html

Certe nia sumoo multe kontribuas al Esperanto-movado en la mondo por libro-kulturo kaj por altigo de Esperanto-kapablo de esperantistoj.

Kontakto, aliĝo:
S-ro HORI Jasuo 371-0825 Japanio, Gunma, Maebasi, Ootone 2-13-3, hori-zonto@water.sannet.ne.jp

## Instruado, movado



**1. Lingolia:** Lernu Esperanton surbaze de la germana lingvo!
Hejmpaĝo: https://esperanto.lingolia.com/de/
Oni povas lerni tie Esperanton ankaŭ helpe de la angla lingvo:
https://esperanto.lingolia.com/en/.

Utiligu ankaŭ en 2019 la bele ilustritan lernkalendaron de Lingolia https://www.lingolia.com/de/kalender

**2. Chen Ji, de El Popola Chinio: jen estas filmetoj por lerni Esperanton.** Mi esperas, ke ili utilos ankaŭ por alilandanoj.

http://www.espero.com.cn/node_7229679_4.htm
http://www.espero.com.cn/node_7229679_3.htm
http://www.espero.com.cn/node_7229679_2.htm
http://www.espero.com.cn/node_7229679.htm



**3. Esperanto estas sukceso ĉe Duolingo!**
Nuntempe 700 mil homoj aktive lernas Esperanton per Duolingo, sed ekzistas potencialo por multaj aliaj, ĉar Duolingo estas la plej granda virtuala lingvo-instruilo en la mondo, kun 300 milionoj da lernantoj.

UEA iĝis partnero de Duolingo por enkonduki lernantojn de Duolingo al la loka movado. Ĉiu esperantisto, kiu jam bone konas Esperanton, povas iĝi Duolingo-ambasadoro kaj krei eventojn en tiu platformo. Kiam lernanto de via regiono atingas la finon de leciono, tiu vidos Duolingo-reklamon invitante al via evento. En la mondo nun ekzistas 500 Duolingvo-grupoj, el tiuj 60 (12%) en Esperanto.

Duolingo povas helpi vin altigi la profilon de via Esperanto-klubo. Se iu en via regiono, interesiĝas pri Esperanto, Duolingo povas nun informi lin/ŝin pri la aranĝoj de via klubo.
Gastigantoj estas volontuloj, kiuj organizas interesajn, agrablajn eventojn, kie Esperanto-lernantoj de ĉiuj niveloj lernas kaj amuziĝas kune. La eventoj – min. unufoje en la monato - povas esti diversspecaj, ekzemple babiladaj rondoj, studgrupoj, ludaj aŭ muzikaj renkontiĝoj en via loka klubo aŭ kafejoj, aŭ promenadoj en urboj aŭ en naturo.

Se allogas vin la ideo organizi eventojn kaj gastigi novajn Esperanto-lernantojn per Duolingo, bonvolu kontakti Emilio Cid cid.emilio@gmail.com.

Post kelkaj tagoj Emilio kontaktos vin por intervjui vin, ĉar la celo estas kunlabori nur kun seriozaj kluboj, kiuj vere renkontiĝas regule. Se via propono estos akceptita, vi povos krei retpaĝon pri via klubo (ekz. por la klubo en Londono, Britio: https://events.duolingo.com/london-esperanto) kaj listigi viajn eventojn. Krome, kaj ĉefe, Duolingo informos ĉiun duolinganon el via regiono, kiu finas la kurson, pri la aranĝoj de via klubo. Potenciale vi altigos vian membronombron.

**4. Poezio tut'libera:** Partoprenu la konkurson de poezio por junuloj
Poezio tut'libera (Poésie en liberté) estas internacia konkurso de poezio kreita en 1998 en franca mezlernejo. Ekde 2018 estas ankaŭ akceptitaj esperant-lingvaj poemoj. Temo kaj formo liberaj. Partopreno senkosta. Partopreno malfermata por ĉiu junulo de 15 ĝis 25 jaraĝaj, de ĉiu lando.
Partopreno nur tra la retpaĝaro www.poesie-en-liberte.fr

Etapoj de la konkurso 2019
- de la 1-a de januaro ĝis la 30-a de aprilo 2019: sendo de la poemoj fare de la partoprenantoj
- en majo: la ĵurio elektas la premiatojn
- fine de junio: oficiala proklamado de la rezultoj en Parizo kaj publikado de ĉiuj rezultoj sur la retpaĝaro
- en oktobro: eldono de cento da poemoj selektitaj de la ĵurio sub formo de ĉiujara Antologio
- fine de novembro: la premiitoj estas invitataj tri tagojn al Parizo por viziti kaj partopreni en antaŭ-publika ceremonio por la transdono de la premioj.

Regularo: Poezio tut'libera estas internacia konkurso de franc-lingva poezio tra la reto, publikigita en la «Bulletin officiel de l'Education nationale» (oficiala bulteno de la franca ministerio pri edukado). Estas organizata de la Asocio «Poésie en liberté» (Poezio en libereco – Poezio tut'libera).
En 2019, duafoje, estos akceptataj poemoj en esperanto.

La partopreno konsistas en la sendo de neeldonita poemo, versa aŭ proza, maksimume 30 versojn aŭ liniojn longa. Ĉiu kandidato povas proponi nur unu poemon. Tamen oni povas proponi unu poemon franclingve kaj alian esperantlingve. 
Oni devas nepre uzi la specialan formularon de la retpaĝaro – www.poesie-en-liberte.fr.
Ĉiu kandidato, per sia sendo, garantias la aŭtentecon de sia teksto. Por ke la partopreno estu validigita, la send-formularo de la poemo devas esti ĝuste kaj komplete plenigita.
Por sia partopreno en la konkurso, la kandidato konsentas:
- la eldonon de la teksto sur la retpaĝaro de la konkurso kaj la retpaĝaroj de la kun-agantoj.
- la eldonon de sia teksto en antologio.
- ĝian uzadon, senpage, por pedagogiaj kaj kulturaj celoj.
La tekstoj devas alveni al la organizantoj antaŭ la lim-dato, nur pere de la retpaĝaro. La listo de la premiitoj estos publikigita sur la retpaĝaro ekde la monato junio. Ĉiu premiito estos informata.

Premio-listo:
- naŭ kategorioj franc-lingve: ses premio-listoj de Francio + tri premio-listoj internaciaj
    Premiitoj de ĉiu kategorio estos invititaj al Parizo 3 tagojn kaj partoprenos la finan ceremonion.
- unu kategorio esperant-lingve
    Almenaŭ unu premiito estos invitata al Parizo 3 tagojn kaj partoprenos la finan ceremonion.

Kontaktoj aŭ demandoj:
gillestabard.PEL@gmail (esperantlingve), www.poesie-en-liberte.fr (franclingve)
Association Poésie en liberté, Maison des Associations 38, boulevard Henri IV, 75004 Paris, France

## Libroj, gazetoj, publikaĵoj

1. **Vollständiges Wörterbuch Esperanto-Deutsch // Plena Vortaro Esperanto-Germana.** Kun ĝojo mi dissendas informon de Prof. Dr. Erich-Dieter Krause: „Fine de la jaro 2018 aperis en Novjorko mia grandampleksa du-voluma verko. Ĉi-sube vi trovos detalojn pri la libro(j) en la informpaĝo de eldonejo MONDIAL. Por detaloj alklaku: https://www.librejo.com
La vortaro estas evidente la *plej aktuala kaj plej ampleksa Esperanto-vortaro en la mondo.* Tial la germanlingva esperantistaro povas fieri pri tiu unikaĵo en la Esperanto-libromerkato. Mi petas vin subteni la diskonigon pri tiu ĉi leksikografia verko. La germana Esperanto-libroservo, same UEA kaj AMAZON (kaj pluraj aliaj) ofertas la librojn."

**2. Esperanto en dialogo:** La retkurso de Rudolf Fischer – post modifoj, aldono de kelkaj ilustraĵoj – estas jam je dispono por instruado, memlerna uzado. „Nahezu 15 Jahre lang hat es gedauert, bis dieses Lehrwerk Esperanto en dialogo nach vielem Entwerfen, Umarbeiten und Ausprobieren in Kursen die vorliegende Form gefunden hat.... Ich wollte meine Erfahrung aus über 40 Jahren Lehrtätigkeit in Esperanto-Kursen in einem entsprechenden Werk zusammenfassen." Tre ampleksa, bone strukturita, nepre rekomendinda, riĉenhava verko. Bv. mem rigardi, uzi, plu rekomendi ĝin! http://agei.esperanto-urbo.de/netzkurs/

**3.** La novaj eldonoj de IpI (Informilo por Interlingvistoj, 106) kaj IfI (ĝia anglalingva eldono: Information for Interlinguists, 06) haveblas rete. Informo de a redakcio (Humphrey Tonkin, Ĵenja Amis, Angela Tellier) ipi@esperantic.org

- **IpI (Esperante):**
  Nova numero: https://www.esperantic.org/wp-content/uploads/2018/12/IpI_106_Final.pdf
  Pli fruaj numeroj: http://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/
- **IfI (angle):**
  Nova numero: https://www.esperantic.org/wp-content/uploads/2018/12/IfI_106_Final.pdf
  Pli fruaj numeroj: http://www.esperantic.org/en/publications/ifi-information-for-interlinguists/

Informilo por Interlingvistoj estas publikaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). IpI kaj ĝia anglalingva eldono (IfI) disponigas informojn kaj ĝisdatigojn en la kampoj de planlingvoj, interlingvistiko kaj lingvoplanado. Ambaŭ eldonoj enhavas detalojn pri eventoj, novaj publikaĵoj, raportojn pri lastatempaj konferencoj, kaj disponigas multajn aliajn informojn por universitatanoj kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri interlingvistiko kaj rilataj kampoj.
La limdato por kontribui al la sekva numero estas la 28a de februaro 2019. Dankon!

**4. Nova versio de PMEG (Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko)** lanĉita. 
Ĝi havas la numeron 15.0.2 kaj estas plua ŝtupo cele al dua eldono kiel papera libro. La aŭtoro, Betil Wennergren, faris ankoraŭ multajn korektojn, kompletigojn kaj ĝisdatigojn. PMEG 15.0.2 haveblas ankaŭ en elŝutebla formo kiel HTML kaj kiel PDF ĉe http://bertilow.com/pmeg/

**5. Historia Vortaro de Esperanto de G. Neves kaj B. Pabst.** "HV estas konkordanco, kiu notas ĉiun unuan uzon de vorto en la komenctempa epoko de Esperanto." Kvankam ĝi interesos verŝajne nur lingvemulojn, en la suba paĝaro vi trovos aliajn, pli publikafablajn verkojn de B. Pabst aŭ redaktitajn de B. Pabst, kiuj povas interesi pli vastan rondon de lingvouzantoj. Ekz.
Fundamento de Esperanto, Oficiala Vortaro, Akademia Dokumentaro, Akademia Nomaro, Lingvaj Respondoj de Zamenhof, Vortaroj de Kabe (unulingva), Zamenhof (germana), Beaufront (franca), Zamenhofaj Vortoj, Norma Esperantologio. La supraj verkoj estas senpage elŝuteblaj ĉe:
https://esperanto-akademio.wikispaces.com/Berlina+Komentario+pri+la+Fundamento+de+Esperanto

**6. Lernolibroj de Ivan Kossey:** „En la lernolibro por 6a klaso mi dediĉis kelkajn lecionojn al retumado en esperanta Interreto kaj al skajpado kun esperantaj eksterlandaj lernantoj. La ĝermo de lernolibro por 6a klaso kune kun jam preta lernolibro por 5a klaso estas elŝutebla en du arĥivoj el paĝoj
dosiero Instr.zip: https://yadi.sk/d/e0UvBDRW3USNgc (libroj por instruisto)
dosiero Multimed.zip: https://yadi.sk/d/dwkZp18U3SicnC (la ĉefa parto)
La interfaco estas en la rusa, sed Vi devas nur klaki la signon de elŝuto. La elŝuto estas malrapida, havu paciencon. Estas disponeblaj lernolibroj en la rusa, hungara kaj Esperanto (por traduki en aliaj naciaj lingvoj) en la dosierujoj Multimed\Libroj\RUS, Multimed\Libroj\HUN kaj Multimed\Libroj\ESP.
Mi estus dankema al ĉiuj por kritiko, recenzoj, sugestoj, rimarkoj."

**7.** Tiuj numeroj de **Internacia Pedagogia Revuo (IPR)** jam povas esti legataj senpage:
http://www.ilei.info/ipr/ipr_2016.htm, http://www.ilei.info/ipr/ipr_2017.htm

## Mallongaj raportoj, rerigardo al la dua duono de 2018

En 2018 en la ILEI-kongreso en Madrid AGEI estis reprezentata de Gustav Neumair. Dankon!

En UK en Lisabon en Tago de Lernado Zsófia Kóródy prezentis la novan lernmaterialon de Rudolf Fischer kaj la planatan, prilaboratan klerigplatformon de la Gemana Esperanto-Centro kaj AGEI por faka instruado, instrukapabligado kaj movada trejnado.

Venis raporto pri lerneja agado, starigo de informtablo, ktp. de Norbert Bludau, Gustav Neumair.
Gratulojn!

Kondelencojn pro la forpaso de nia membro Nora Caragea en novembro 2018, kiu dum multaj jaroj per instiga ĉeesto en Espernato-renkontiĝoj, partopreno en seminarioj, ktp. estis ne nur subtenema al instruado de Esperanto, sed per eldonado de siaj tradukoj ktp. kontribuis al disvastigo de la lingvo per literaturo.

Ĝojigis nin raporto pri klerigadoj, seminarioj de BAVELO, kaj ankaŭ el Hamburg. Tie la Hamburga Esperanto-Societo (HES) sub gvido de Jürgen Wulff kaj Ralph Glomp invitis al Kulturladen en St. Georg. Zsófia Kóródy - prezidantino de AGEI kaj kunlaborantino de GEA-Filio por Klerigado & Kulturo en Herzberg - dum la lasta semajnfino en novembro gvidis spertoriĉan kaj viglan seminarion pri Esperanto-gramatiko. Okazis interesaj surlokaj diskutoj kaj klarigoj. Vespere kantis Ralph Glomp, Kaŝi kaj Tanja. Temas pri riĉaj kaj interesaj kantrepertuaroj. Evidente HES lerte organizas ankaŭ "muzikan metiejon" en Esperanto. Gratulon!

**POR 2019**
**Dankon al ĉiuj, kiuj remembriĝis, daŭre subtenas nian agadon por instruado de Esperanto!**
**Ni renkontiĝu en la AGEI-jarĉefkunveno en GEK en Neumünster: 7-10 junio 2019**